## FONDAĴO VIKIMEDIO

Origine en januaro 2001, Vikipedio estis privata projekto, subtenata de la interreta entreprenisto Jimmy Wales. En junio 2003 li kreis la ne-profit-donan Fondaĵon Vikimedio (Wikimedia), al kiu li transdonis ĉiujn rajtojn kaj materialojn rilate al Vikipedio. Ĝi havas internacian estraron, nuntempe sub la prezido de la francino Florence Nibart-Devouard.

Vikimedio disponigas la retejojn, sed interne la projektoj havas aŭtonomion, ekzemple la administrantoj de la esperantlingva Vikipedio estas elektitaj de la Esperanto-vikipediistoj. Kaj Vikimedio ne respondecas pri la enhavo, sed nur tiu persono, kiu enmetis la enhavon.

Necesas varbi kaj kolekti donacojn, respondi al la amaskomunikiloj, subteni la teknikon kaj komputilojn kiuj konservas la datumojn...

## LINGVOJ

Cetere, Jimmy Wales esprimis sin ĉiam pozitive pri la lingva diverseco de Vikipedio, kaj alvokas atenti ne nur grandajn lingvoversiojn, sed ankaŭ helpi al Vikipedioj en lingvoj de la t.n. Tria Mondo.



## KIEL VI POVAS HELPI

Vikipedio dependas de la subteno de multaj homoj, kaj bonŝance ili subtenas: pluraj cent mil homoj jam kontribuadis al tuta Vikipedio. Kompreneble la Vikipedio en Esperanto bezonas precipe la helpon de esperantistoj.

## LEGU

Legu Vikipedion, ĉu pro interesiĝo pri ĉiaj temoj, ĉu studante pri Esperanto. Ricevu impreson pri la amplekso kaj kvalito de la libera enciklopedio. Sciigu al viaj geamikoj pri Vikipedio.

## KUNLABORU

Ĉiu rajtas kunlabori, ankaŭ vi! Multaj vikipediistoj komencis korektante ekzemple tajperaron aŭ ŝanĝante vortumon en artikolo. Plej bone estas se vi (senpage kaj facile) registriĝas kaj lernas pri la bazaj reguloj.

## DONACU


Wikimedia Foundation
Konto: 068-9999995-01
Dexia bank (Bruselo)
IBAN: BE43 0689 9999 9501
BIC: GKCCBEBB

Aŭ al UEA-konto *ecxi-v*
kun celo „Vikipedio“

http://eo.wikipedia.org

respondeculo: Ziko van Dijk (2008, CC-BY-SA); helpis Chuck Smith, Yves Nevelsteen, Arno Lagrange, Peter Balâž, Hay Kranen k.a.











# VIKIPEDIO: LA LIBERA ENCIKLOPEDIO

## VIKIPEDIO EN ESPERANTO

La esperantlingva Vikipedio apartenas al la plej unuaj lingvoversioj de la libera enciklopedio: En 2001 Chuck Smith penis por traduki la programarojn kaj varbi vikipediistojn. Ĝis 2008 jam proks. 900 homoj kontribuadis al ĝi, kaj estiĝis 100.000 artikoloj en Esperanto: pri la movado, sed ankaŭ pri aliaj temoj kiel astronomio, literaturo, historio aŭ biologio.

Vikipediistoj verkas novajn artikolojn, korektas kaj plilongigas jam ekzistantajn, ordigas por fari artikolojn pli facile troveblaj, helpas al novuloj kaj informas pri ĝi en la Esperanto-komunumo.



> „Vikipedio estas tre interesa ĉar temas pri *libera* enciklopedio, sed ankaŭ *malferma*, ni povas en ĉiu momento korekti, modifi, fajnigi..."
>
> Barbara Pietrzak, pola ĵurnalistino, ĝenerala sekretario de UEA

## VIKIMEDIA KOMUNEJO

En unu komuna kolekto oni konservas bildojn, aŭdo- kaj vido-datumojn por ke oni povu utiligi ilin en ĉiuj projektoj de Vikimedio, en ĉiuj lingvoj. Ni havas intertempe pli ol 2,7 milionojn da datumoj. Kaj eble ankaŭ vi povas kontribui, ekzemple kun viaj fotoj el renkontiĝoj?

Franz Marc: *Blua ĉevalo*



Jomo, Esperanto-kantisto el Francio



Monto Engelberg, Svislando



(Ankaŭ la aliaj fotoj en tiu ĉi informilo estas el Komunejo)

## VIKIFONTARO

En la libera kolektejo por fonttekstoj troveblas historiaj dokumentoj aŭ malnovaj libroj, ankaŭ pri Esperanto. Kelkaj tekstoj venas rekte el la Arkivo de UEA, kiel la „Nepre konfidenca raporto" de Anton Vogt el la jaro 1928, pri la problemoj en la tiama Centra Oficejo. Helpu transtajpi el skanitaj kopioj.

## VIKILIBROJ

Plia vikimedia projekto kun Esperanta enhavo estas Vikilibroj. En tiu projekto oni povas kontribui verkante pri lernolibroj, pri ĉiaj temoj. Ekzemplo en Esperanto estas la „Manlibro pri tradukado" aŭ la lernolibro por la kataluna.

### *Historio de Esperanto en Vikipedio*

Ekzemple pri Esperanto-historio ekzistas amaso da artikoloj en Vikipedio, interalie:

> Biblioteko Hector Hodler
> Esperanto (gazeto)
> Historio de UEA
> Ivo Lapenna
> Komuna Seminario
> Landa Asocio
> Louis de Beaufront
> Pra-Esperanto
> Universala Kongreso
> Unua Libro
> Volapuko kaj Esperanto